

V-19179/37

(1968)

Bulgara

ESPERANTISTO



1968

4

	Paĝo
Ĉefartikolo. Sukcesoj kaj taskoj de nia junularo (Boĵidar Leonov)	1
N. Alvaĝiev. Imaret-moskeo	3
Einar Dahl. Dimitrov estis kiel torĉo en la mallumo	4
D-ro Dora Beneva-Naĉeva. Kaliakra	5

ORGANIZA VIVO

Maria Nikolova, K. Paspalev, D-ro Z. Boĉev, Vesela Ivanova, Anĉo Anĉev, N. Nikolov	6
N. I. Sigal. Soveta-bulgara amikeco	8
* * * Muzeo Ciolkovskij	9
Ivan Zahariev. Rememoroj pri Ĉudomir	9
Pola Radlo. Sporta konkurso okaze de la Pac-konkuro	10
G. Waringhien kaj aliaj. Oficiala komunikaĵo de la Akademio	10
Il. Andreev. Neforgesebla travivaĵo	13
At. D. Atanasov. Logiko kaj lingvo	14

Kovrilpaĝo: Vidaĵo de Varna, kie okazos la XX-a Jubilea Kongreso de la fervojistoj-esperantistoj (11—17. V. 1968) kaj la 37-a Kongreso de la bulgaraj esperantistoj (19—21. V, 1968).

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0.15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Ŝulova ul. D. 5/7 kv. 44, Moskva, M—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



SUKCESOJ KAJ TASKOJ DE NIA JUNULARO

Se ni trarigardos la historion de kiu ajn movado, ĉiam ni povus vidi, ke la junularo kontribuas multon por la grandaj sukcesoj kiuj karakterizas tiun movadon. La kaŭzo pri tio sendube estas la kapableco de la junularo partopreni kun granda entuziasmo en diversaj iniciatoj, praktike realigi diversajn ideojn ktp.

BEJ en sia agado kiel junulara sekcio de BEA ankaŭ klare montris ke ĝi povas kolekti la fortojn de la E-junularo en nia lando por fruktodona laboro.

Proksimiĝas la tagoj de la 37-a Kongreso de BEA, tagoj dum kiuj ankaŭ BEJ devas raporti pri la atingitaj sukcesoj dum la lastaj 4 jaroj. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj tiuj sukcesoj estas sufiĉe multaj. Tute ne eblas en mallonga artikolo paroli detale pri la atingitaj sukcesoj.

Dank' al la sukcesa organizado de diversaj internaciaj E-aranĝoj en nia lando, de vigla partopreno en diversaj internaciaj E-iniciatoj en eksterlando BEJ gajnis aŭtoritaton inter la monda E-junularo.

La plej amasaj E-manifestiĝoj de BEJ estis la organizado de la Naciaj E-festivaloj. Unu post alia la sukcesoj pligrandiĝis en la sinsekvaj festivaloj en Dimitrograd, Loveĉ, Kazanlâk. Tion oni povas konstati ne nur per la fakto pri kreskado de la amasa partopreno en la festivaloj (ekzemple la festivalon en Dimitrograd partoprenis pli ol 1000 gejunuloj, kaj en Kazanlâk — 1500), sed ankaŭ per la plialtigo de ĝiaj kvalitoj. La sukcesa aranĝo de tiuj amasaj E-junularaj festivaloj estas ankaŭ rezulto de nia fruktodona kunlaboro kun la amasa organizaĵo de la bulgara junularo — la Komsomolo. Ni ne eraros, se ni diros, ke dank' al la granda helpo fare de tiu organizaĵo ni sukcesis bone aranĝi la festivalojn.

Jam estiĝis tradiciaj en nia lando la organizitaj 3 E-laborbrigadoj. La ideo pri la organizo de tiuj laborbrigadoj aperis en 1965 j., kiam ni aranĝis la Unuan Nacian E-laborbrigadon. Tiam en daŭro de unu monato 80 gejunuloj el diversaj urboj de nia lando obstine laboris konstruante la panoraman vojon sur Vitoŝa-monto. Rezulte de la granda intereso en eksterlando BEJ-Estraro en la sekvinta jaro organizis la I-an Internacian E-Laborbrigadon en Veliko Târnovo kaj en 1967 — la II-an E-Laborbrigadon en Loveĉ, en kiu partoprenis 150 gejunuloj el 7 landoj. La sukcesa aranĝo de la laborbrigadoj klare montris, ke la monda E-junularo estas kapabla ne nur kolekti en kongresoj, uzi Esperanton en kongresaj kaj seminaĵaj diskutoj

ktp., sed ankaŭ labori en daŭro de unu monato kaj en komuna vivo kaj laboro plifortigi la internacian amikecon!

BEJ estas ĝoja, ke la iniciaton pri aranĝo de festivaloj kaj laborbrigadoj ankaŭ postsekvis pluraj TEJO-sekcioj, ekzemple PEJ, HEJ, UEA ka.

En nia lando estas vigla ankaŭ la studenta E-agado — la studentoj en 3 universitataj urboj en Bulgario libervole studas E-on; en la lando ekzistas 7 studentaj E-societoj. Tute ne estas hazarde ke la I-a STELO-kongreso okazis en Ruse. Bulgario ankaŭ estas unu el la landoj kie praktike realiĝas la Interkonsento STELO-TEJO-ISAE.

Jes, rimarkindaj estas la sukcesoj de nia junularo, sed ankoraŭ pli grandaj estas la taskoj kiuj staras antaŭ ni.

Nun en nia lando okazas antaŭkongresa konkurado por plifortigo de BEA. Ankaŭ ni, la membroj de BEJ, devas aktive partopreni en tiu konkurado, ni devas strebi por varbado de novaj membroj, pri fondiĝo de novaj junularaj grupoj, varbado de abonantoj por „BE“ kaj aliaj E-revuoj ktp.

Kiuj estas la plej proksimaj aranĝoj en kiuj BEJ povas kaj devas partopreni? Je 19—21. V. 1968 en Varna okazos la ĝenerala kunsido de BEJ, en kiu ni devas raporti pri nia agado, elekti novan BEJ-estraron. Do ni devas inde nin prezenti kaj prepari la raporion ĝustatempe. Je 28. VII—6. VIII. 1968 dum la tagoj de la IX-a Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentaro en Sofio okazos Esperanto-renkontiĝo. Je 13. VIII—20. VIII. 1968 okazos la III-a STELO-Kongreso en Francio. Ĉi-jare pro tio ke BEJ-estraro estas ege okupata per la organizado de la Internacia E-renkontiĝo dum la IX-a Festivalo, ni ne povos aranĝi Internacian E-laborbrigadon. Sed ni rekomendas al niaj BEJ-anoj partopreni en la kvara internacia E-laborbrigado en Pollando. BEJ-estraro zorgos ke nur la plej aktivaj niaj membroj reprezentu inde Bulgarion!

Do, karaj ĝejunuloj, al fruktodona laboro por la estonta sukcesplena agado de BEJ, por la plifortigo de nia anaro!

JURNALO REPRESITA PER SATELITO

Epokfara tago en la historio de ĵurnalismo estis la 17-a de oktobro 1967. En tiu tago Londona ĵurnalo transsendis unu paĝon trans Atlantikon al San Juan en Portoriko — per la satelito „Early Bird“. Tio estis la unua tiaspeca uzo de satelito, sed en estonteco oni verŝajne ĉiam pli ofte aplikos la saman metodon por rapidigi la distribuon de ĵurnaloj tra grandaj

distancoj.

La oficejo en Fleet Street elsendis unu paĝon el sia ĵurnalo „Daily Express“ pere de unupaĝa faksimil-sendilo Muirhead. La paĝo atingis la oficejon de „El Mundo“ en San Juan, pere de la satelito, en formo de fotonegativo, el kiu oni poste faris presklišon. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

Dum la printempa specimenfoiro en Budapeŝto okazos la dua konferenco de la Teknika Ligo (faksekcio de ISAE). La konferencanoj havos eblecon transrigardi la eksponaĵojn de la foiro.

Informojn pri la organizo de la konferenco donas la Teknika Komisiono de HEA, Kenyérmező u. 6, Budapest — VIII, Hungario.



IMARET-MOSKEO

legendo de N. Alvaĝiev

Fruprintempe je 1364 jaro komenciĝis la sieĝo de urbo Plovdiv. Multaj estis la atakoj de la turkoj, sed la bulgaroj defendis sin obstine. Lala Ŝahin, la fama militestro de Sultano Murad, ĝemadis, ke lia nomo restos malfamigita, ke baldaŭ li ne aŭdos la karan vorton „aferim“ (brave) el la buŝo de sia suvereno. Kaj kiam li perdis la kredon pri baldaŭa venko, la kompato de Alaho elverŝiĝis sur lin. Estas trovitaj la akvotuboj, lasitaj jam de la romia epoko. Delonge li serĉis ilin! Por ilia trovo li promesis diversajn premiojn, direktis diversajn minacojn al siaj subuloj, sed ĉiam vane! Kaj nun! Bonŝanco!

Kiam la defendantoj komprenis ke plua kontraŭstaro estos vana, ili malfermis la pezan pordon de la fortikaĵo.

Ne elfluis multa sango sub la janiĉara jataĝono, ne ekflamis brulegoj. La granda militestro ne ordonis ruinigi la urbon, ne pro ia kompato, sed ĉar li konis ĝian valorecon. Iuj el la viroj, la plej bravaj, estis senkapigitaj, aliaj klinis la kapojn, kaj triajn oni forveturigis al malproksima ekzileco, kaj kun ili virinoj kaj infanoj. Ekrapidis eŭnukoj por elekti belulinojn por paŝaoj kaj estroj. Famaj estis la plovdivaninoj per sia beleco. Pri ili oni kantis kantojn. La plej bela el ili, nomata Elica, estis destinita por la paŝao Ŝahabedin, filo de Lala Ŝahin. La patro forveturis kun sia armeo antaŭen, al Serbio, kaj li lasis Ŝahabedin administri Filibe*. Belulo estis la juna viro, svelta, kun fera forto en siaj muskoloj. Lia kapo, kvazaŭ farita el nigra marmoro. Liaj grandaj okuloj fajreris elsub lia densa hararo bukla, kiel ondigita de venteto laga akvo, kaj el lia brunhaŭta vizaĝo la rideto ne malaperis.

Ekvivis Elica en paŝaa domo. Li faris ŝin sia amatino. Kaptis ŝi lian koron. Ĉiujn ŝiajn dezirojn li plenumadis, eĉ li ne altrudis al ŝi la Mahometan religion. Li lasis ŝin aparteni al la kristana religio. Li aĉetadis al ŝi diversajn ornamaĵojn, buntajn vestaĵojn. Ŝi estis la ununura kaj plej amata edzino en lia haremo, kaj li ĉesis ami la ceterajn edzinojn.

La bulgarino sentis lian bonecon kaj tenecon, sed malvarmeco blovetis el ŝia koro. Ŝi ne povis forgesi tion, kio okazis en la malgranda dometo sur la altaĵo ĉe la preĝejo „Sankta Kostadin“. La turkoj mortigis ŝiajn patron, patrino kaj frateton antaŭ ŝi, antaŭ ŝiaj okuloj. Vere, ŝia dolor malmalgrandiĝis, sed la malamo ankoraŭ flamis en ŝia koro. Profunda ĝi estis!

Forpasadis tagoj. Ĉu oni ne diras, ke la tempo sanigas? Elica kvazaŭ aliĝis. Ĉiam pli ofte, kaŝe, ŝia rigardo haltiĝadis sur la vizaĝo de la paŝao, palpis liajn largajn ŝultrojn, fortajn manojn, kaj ŝi mezuradis lin de la kapo ĝis la piedoj. Kaj tiam ŝia koro batadis alimaniere. Unue ĝi konvulsiis, sed poste larĝiĝis, kaj ŝi sentadis ke dolĉaj tremoj invadis ŝian junan korpon. Ŝi sentis, ke io rompiĝas en ŝia animo, kaj ŝi pripensadis, ĉu ne estas vane, ke ŝi ankoraŭ kaŝas tiun ĉi malamon en sia koro? Ĉu ŝi ne vidas? Sian sorton ŝi ne ŝanĝos, kio estis ne revenas. Kial ŝi haltigi sian ardan sangon, kial do ŝi devas soifi pri amkaresoj? Ĉu ŝi povas nei la tenerecon de Ŝahabedin, kiu ĝiŝ nun eĉ ne unu malbonan vorton eligis el sia buŝo. Unufoje li diris al ŝi, ke li konstruigos moskeon sur la korto de serajlo, tie, ĉe la rivero, kaj sur ĝi estos ne nur la turka lunarko, sed ankaŭ estos kaŝita kristana kruco. Kaj por la Alaho, kaj por ŝia kristana Dio. Li faris ĉion ĉi. La konstruado de la moskeo jam estis komencita, kiam el Edrine* alvenis sciigo, ke Ŝahabedin povas konstrui la moskeon. La rodopaj majstroj jam finlaboris la moskeon. Ili najlis jam la kupolan tegmenton kaj faris dekojn da tavoloj el brikoj por la minareto.

Sed ne ĉio kion homo ekdeziras plenumiĝas. Ankaŭ en tiu ĉi okazo estis tiel. Malicaj okuloj divenis la pensojn de la paŝao. La hoĝoj vidis tion kion neniuj el la verreligiuloj ankoraŭ vidis — ke la nova moskeo desupre similas je la kruco de la gjauroj**. Malico eknestis en la brustoj de la hoĝoj kaj kaŝe de la paŝao, ili sendis sciigon al Murad kaj Lala Ŝahin, kiu jam estis ĉefveziro.

Venis la maljuna militestro en Filibe. Li volis vidi per siaj propraj okuloj. Iel falsa ŝajnis al li la ĝojo de lia filo, kiam la lasta brakumis lin, mensogaj ŝajnis al li la vortoj de la filo. Li iris en la serajlon por ripozi, por fari sian preĝon, kaj li ankaŭ ekdeziris vidi la novan moskeon. Vidinte la tegmenton kvazaŭ bulo premis lian gorgon. Vere estis! Ili eniris en la moskeon. Kiam Ŝahabedin alpaŝis la sojlon de la malhela ĉambreto por montri al sia patro la lokon kie oni metos la sanktan koranon, Lala Ŝahin faris kapsignon al la du kjurdoj, kiuj staris flanke, kaj tuj la kapo de la filo ruliĝis sur la ŝtona planko. Kiel fontano elŝprucis purpura sango, la korpo restadis iomete staranta, poste falis.

* Edrine estas turka nomo de Odrin.

** Gjauro — turka vorto — alireligiulo, nemahometano.

* Filibe estas turka nomo de Plovdiv.

Forta doloro trapikis la patran koron, sed la kredo al Alaho estis pli forta ol la ĉagreno. Por unu alireligianino lia filo forgesis la testamenton de siaj praavoj, kaj li punis lin, kiel estos punita ŝi.

Poste Lala Ŝahin forportis la salumitan kapon en Edrine kaj ĵetis ĝin sur la plankon antaŭ la piedoj de Murad. Tio konsternis la sultanon. Lin oni nomis mortiginto de alireligianoj, laŭ liaj ordonoj oni verŝis riverojn da sango sur la bataalkampoj, sed tian kruelecon li ankoraŭ ne vidis. Li diris eĉ ne unu vorton al sia ĉefveziro — nek bonan, nek malbonan. La sultano ordonis entombigi la kapon sur la altaĵo „Osmanĝik“ apud urbo Brusa, kie estis la tomboj de la sultanoj.

La senkapigitan korpon oni entombigis en la korto de la forlasita moskeo. Tage kaj nokte ne estingiĝis la flava flameto de la lucerno sur la tombo de Ŝahabedin. Ekbruligis ĝin iu el la turkoj, ekbruligis ĝin iu el la sklavoj. Li estis amata de la unuaj kaj de la aliaj.

Pasadis la tempo, ne haltis. Trankvile sidis la sultano kaj la ĉefveziro kaj profunde ĝemadis. Turmentis ilin ĉagreno. Ĉu tiu malbenitulo, la derviŝa ŝejko ne trompis ilin, kaj ili

forprenis la vivon de Ŝahabedin? Ĉu iliaj animoj trovos trankvilon, aŭ vagados tra la stratoj de Filibe, serĉante pardonon de la animo de la mortigito?

Sultano Murad decidis, kaj li efektivigis sian decidon. En la korto de la ne fine konstruita moskeo en Filibe oni konstruu „imareton“,^{*} en kiu oni disdonu senpage manĝaĵon al la malriĉuloj kaj vojaĝantoj el kiu ajn religio ili estas. Tridek vilaĝojn el la distrikto oni donacis al la „imareto“ por financi ĝin.

Forpasis jaroj. Mortis Murad, mortis ankaŭ Lala Ŝahin. En jaro 1421 surtroniĝis sultano Murad la Dua, kiu ordonis la finkonstruon de la moskeo kaj super ĝia pordo enfosis ŝtonplaton surskribitan, por ke oni sciu la veron — kiu konstruis, kaj kiam estas konstruita la moskeo.

Kaj ĝis nun maljunaj turkoj rakontas, ke el la malhela ĉambreto de tempo al tempo oni aŭdas sufokan ronkadon, kaj, ke sub la stukaĵo vidiĝas makuloj el sango.

* imareto — turka vorto = gastejo

El bulgara lingvo tradukis:

Elena D. Vaskova

DIMITROV ESTIS KIEL TORĈO EN LA MALLUMO

(El la letero de la sveda parlamentano kaj senatano Einar Dahl al D-ro Zahari Boĉev, Bulgario, publikigita kun la konsento de la aŭtoro)

Kara amiko,

Unue mian elkoran dankon pro la libreto^{*} kun salutoj okaze de la kristnaska festo kaj la Nova jaro.

Mi tre admiris la konatan gvidanton de la Revolucio de Bulgario Dimitrov, kaj mi admiris iam lian konduton antaŭ la naziista tribunalo, kiu provis timigi lin, sed kiu ne sukcesis silentigi la kuraĝan defendanton de la demokratio. Lia idealismo fortigis lin en malfacilaj cirkonstancoj. Lia konvinko superis ĉiajn malhelpojn. Lia intelekto estis preskaŭ kiel torĉo en la mallumo,

Mi sendis al li kiel Novjaran donacon la libron „G. Dimitrov“ de Stela Blagoeva.

kio altiris al si la atenton de la subpremitoj.

Kaj li kronis sian vivolongan batalon per starigo de la Patrolando, kiun li kune kun siaj simpatiantoj liberigis de la jugo.

Lia memoro certe vivos kiel bona ekzemplo tra la jarcentoj. Li nun sidas en la Panteono, kie la herooj de la homaro kolektiĝas, post kiam ilia termigrado finiĝis kaj la laboriloj falis el iliaj manoj.

Kiel gvidsteloj tiuj gigantoj de la homaro lumas sur la folioj de la historio.

Einar Dahl

De la 28-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1968 en Sofio dum la tagoj de la IX-a Monda Festivalo de la junularo kaj studentoj okazos la renkontiĝo de la junaj geesperantistoj kun plej diversaj manifestiĝoj.



de D-ro Dora Beneva-Načeva

En frua mateno
mi sola promenas
tra l' oraj grenkampoj
de Dobruĝa ĉarma.

Kaj antaŭ mi, kvazaŭ en ia
mirinda fabelo magia,
aperas de Kab' Kaliakra
l' antikva fortres' detruita
kaj ties pint' akra,
de l' brila aŭror' lumigita.

De musk' kaj heder' surkreskitaj,
per flava primol' ornamitaj,
en tiu pejzaĝ' grandioza,
en dormo eterna ripozas
ruinoj de muroj granitaj.
Kaj tie — malsupre bluetas
la golfo spegule kvietas
de Kab' Kaliakra majesta,
kaj kvazaŭ ĝi estas
kuŝanta senzorge en sino
de ia tenera patrino . . .

Post longa kurad' furioza
kaj tre lacigitaj de ŝtormoj,
la ondoj de l' maro ripozas
en dolĉa trankvilo kaj dormo.
Sur borda krutaj' pitoreska
skarlataj papavoj nun kreskas
kaj ĉiuj, lulataj de l' vento
rakontas

antikvan legendon:

„En fora pasinta epoko
ni loĝis sur tiu ĉi loko —
ni, kvardek blondharaj knabinoj,
unuenuaskitaj filinoj
de la vojevodoj bulgaraj.
Tra l' tuta patrujo tre kara
per kantoj sin portis la famo
pri nia nobleco kaj ĉarmo . . .

Ho ve! Malamiko kun rab-apetito
invadis la karan Patrujon subite.
Kaj falis sinsekve fortres' post fortreso;
kaj falis sen tim' vojevodoj senĉese,
post longa sangverŝa batalo obstina.

Sed fine
jam venis la horo fatala por nia
fortres' Kaliakra. En sturmo rabia
la hordoj, rampante en longaj kolonoj,
kriegis simile al iaj demonoj
kaj falis multnombre lukt-vicoj iliaj,
sed sekvis senhalte sturmantoj aliaj . . .

Kaj tiam ni, kvardek bulgaraj knabinoj,
en tiu terura batal' partoprenis:
luktante, ni ĉiuj tre brave nin tenis
kaj kune kun patroj kaj fratoj
renkontis senlace la batojn
de l' hordaj atakoj senĉesaj.
Sed falis la granda fortreso
de Kab' Kaliakra fieraj,
post longa rezist' senespera.

En tiu ĉi lasta krizhoru,
vidinte kun tim' en la koro,
ke venas terura vivsorto,
preferis ni digne la morton:
kun sento fieraj, sen ploro,
ni ĵetis nin de l' promontoro
en tiun abismon de l' maro
sen ia ajn vivobedaŭro . . .

Kaj tiuj papavoj ruĝantaj,
el nia sang' estas kreskantaj —
el nia sang' iam ŝprucinta
sur tiun ĉi krutan rokinton . . .

Ne mortis ni tie ĉi vane
en lukt' kontraŭ fiaj tiranoj:
Patrujo nun vivas libere
kaj ĉiam la homoj surtere
kaj sampatrujanoj tutkore
kantados pri ni rememore:

„Eterne vivantaj ja restas
mortintaj en lukto honesta . . .“

Jam ĉesis la flustro mistera
de l' mortaj knabinoj fieraj;
zefiro eklulis kviete
graciajn papavajn trunketojn,
kaj ree en mia animo
eksonis la kanto sublima:

„Eterne vivantaj ja restas
mortintaj en lukto honesta . . .“

Tradukis el la bulgarlingva originalo:

Simeon M. Simeonov

* KALIAKRA — vorto greklingva, kiu signifas: „Bela Promontoro“, per kiu oni nomas la rokan promontoron (kapon) ĉe la bulgara bordo de la Nigra Maro, 25 km oriente de urbo Balĉik. Je la fino de la XIV-a jc ankaŭ ĉe la bulgaraj feŭdestroj Balik kaj Dobrotica ĝi prezentas potencon fortikaĵon. En tiu epoko la turkoj invadis la landon, atakis la fortikaĵon kaj konkeris ĝin, malgraŭ la heroa rezisto de la defendantoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ 40 bulgaraj junulinoj, kiuj preferis sin ĵeti en la abismon de la marbordo, anstataŭ fali en la manojn de la kruelegaj invadintoj.



ORGANIZA VIVO

KIOM KOSTAS LA ĜOJO

La E-societo en Svilengrad estas nomata „Nova Mondo“. Ĉe la societo ni organizis junularan grupon. Ĉiuj membroj de la grupo estas gelernantoj en la gimnazio. Kvin reprezentantoj de la grupo vizitis la esperantistaron Ĵeljazka. Si loĝas en vilaĝo Momkovo. Ĵeljazka estas malsana, ŝia malsano estas poliomjelito, jen pro kio ŝi ne povas marŝi, sed ŝi estas tre, tre bona esperantistino. Ŝi ricevas leterojn el la tuta mondo. Ŝi montris al ni siajn korespondadojn. Per Esperanto ni opinias, ke ŝi apenaŭ iomete forgesas pri sia malsano. Ĵeljazka ludas ankaŭ ŝakon. Du knaboj el nia urbo ludis kun ŝi, kaj ŝi venkis ilin. Ni faris al nia amikino modestan donacon. Ni, la junaj geesperantistoj, restis tre kontentaj de nia renkontiĝo, ĉar ni vidis kion povas fari Esperanto, kaj mi opinias ke ŝi ankaŭ restis kontenta.

Karaj geamikoj, mi petas, skribu al ŝi!

Ŝia adreso estas: Ĵeljazka Todorova, vilaĝo Momkovo, distrikto de Haskovo.

Maria Nikolova

STATISTIKOJ DE U.N.

Inter 1960 kaj 1965 la monda loĝantaro kreskis de 3005 milionoj ĝis 3295 milionoj. La jara kresko estis plej malgranda en Eŭropo: 0,9%, poste en Orienta Azio (1,4%), poste en Norda Ameriko kaj Soveta Unio (ambaŭ 1,5%). La plej rapida kresko montriĝis en Suda Ameriko (2,8%), Suda Azio (2,5%) kaj Afriko (2,3%).

En la Statistika Jarlibro de U.N., kie aperis tiuj ciferoj, troviĝas ankaŭ statistikoj pri ekonomio, sociologio, kulturo kaj klerigo dum la pasintaj 9 jaroj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

AJTOS. Konekse kun la 50-jara jubileo de la Granda Oktobro nia societo aranĝis vitrinon kun varia enhavo: sloganoj, lernolibroj, E-literaturo, korespondadoj el Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hispanio, Britlando k. a.

En oktobro p. j. ni malfermis kurson por komencantoj kun 10 partoprenintoj. Kursgvidanto G. Lazarov.

Je la 15-a de decembro 1967 ni organizis „Vesperon de la esperantisto“, kaj E-ekspozicion.

La asocia organo havas 12 abonantojn.

La membrokotizon ni kolektis kaj sendis al CK de BEA 100%.

Ni partoprenos amase en 37-a nacia E-kongreso.

K. Paspalev

NOVAJ ESPERANTO-SOCIETOJ

En vilaĝoj Ivanovo kaj Obretenik okazis propagandaj kunvenoj. Parolis k-doj Petr Genov kaj D-ro Zahari Boĉev pri la sukcesoj de Esperanto en la mondo.

La ĉeestintoj decidis fondi societojn: „Fajrero“ en Ivanovo kun 10 membroj kaj „Amikeco“ en Obretenik kun 14 membroj. Donka Petkova Todorova, estro de la loka poŝtoŝefo, estas elektita kiel prezidanto de la societo en Ivanovo, distrikto de Ruse.

En Obretenik laboras kiel estro de la loka apoteko Trifonka Vasileva Vladimirova, kiu parolas Esperanton kaj partoprenis en kelkaj internaciaj renkontoj. Ŝi studis Esperanton en sia naskiĝurbo Karlovo sub la gvidado de nia neforgesebla amiko Cvetan Cvetkov. Vladimirova laboros entuziasme en la societo kiel sekretario.

La du societoj jam malfermis E-kursojn.

Ni devas esprimi nian dankon al la senlaca kaj fervora esperantisto el Dve Mogili k-do Petr Genov, vicprezidanto de societo „D-ro Zamenhof“, kiu estas iniciatinto por la fondiĝo de ambaŭ societoj.

D-ro Z. Boĉev



JARKUNVENO DE LA POŝTISTOJ EN SOFIO

Je la 7-a de februaro 1968 okazis la jarkunveno de la Poŝtista E-societo „Heroldo“

Per unuminuta silento estis honorita la memoro de la sindona esperantisto Kostadin Ganev, eksvicministro de P.T.T.

La prezidanto k-do Draguŝko Petrov tralegis la jarraporton. De la plendeta ekspono oni konstatis, ke dum la pasinta jaro la Estraro faris seriozajn klopodojn, dank' al kiuj estis plenumitaj ĉiuj antaŭstarantaj taskoj. Pliiĝis la aktiveco de la membroj kaj oni varbis 29 novajn membrojn. La kursoj finiĝis sukcese. Por la esperantistoj, kiuj deziras perfektigi k-do A. Grigorov gvidis senpagan kurson duonhoron antaŭ la kunveno. Samtempe li redaktas la Bultenon de Poŝtita E-societo „Heroldo“.

Je la fino la kunveno voĉdonis rezolucion kaj konvenajn decidojn. Omaĝe al la antaŭstaranta 37-a Nacia Kon-

greso de BEA oni decidis kolekti la membrokotizojn 100% ĝis la 31-a de marto 1968 kaj pligrandigi ĝis la fino de la jaro la nombron de la membroj. Oni decidis ankaŭ plibonigi la vizitadon de la kunvenoj, variigante kaj interesigante la tagordon kaj garantiante pli bonajn kondiĉojn por okazigo de la kunvenoj. Oni decidis organizi la varbadon de abonantoj de E-jurnaloj ktp.

La reprezentanto de BEA k-do Stojan Kostadinov bondeziris al la societo, ke ĝi okupu ĉiam unu el la unuaj lokoj inter ĉiuj societoj, kiun ĝi okupas ĝis nun.

La kunvenon fermis nia sindona samideano D. Karagjozov kiu diris: per komunaj fortoj ni marŝu antaŭen al novaj venkoj, por ke E-movado progresu inter la poŝtistoj.

Vesela Ivanova

FESTVESPERO DE LA ESPERANTA LETERO

La festvesperon de l' esperanta letero, dediĉitan al la 80-jara datreveno de la kreo de Esperanto kaj 60-jara datreveno de la fondiĝo de Bulgara Esperantista Asocio la esperantistoj en Mezdra preparis tre diligente. Pro tio ĝia vizitado estis amasa kiel de la societaj membroj, tiel ankaŭ de multaj gastoj.

Post la apero de la korespondanonco pri la preparata letervespero en „Nuntempa Bulgario“ ni ricevis pli ol 60 leterojn el 9 landoj. Al ni skribis instruistoj el Francio, Estonio, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario, laboristoj el Pollando kaj Hispanio, infanoj el la malproksimaj siberiaj vilaĝoj, studentoj el Litovio kaj Germana Demokratia Respubliko.

S. Egorov el Riga, Litovio, ekzemple, interalie skribas al ni: „Mi salutas la esperantistojn en Mezdra konekse kun la festvespero de la letero kaj mi deziras

sukceson al ili en la disvastigado de Esperanto — lingvo de la paco kaj amikeco. Mia avo Miĥail Mojseev estis partopreninto en la liberiga rusa-turka milito kaj estis honorita per ordeno pro braveco. Vivu la bulgara-soveta amikeco. Vivu Esperanto!“

A. Müller el GDR detale rakontas kiel ili preparis la celebradon de la 50-jara datreveno de la Granda Oktobro. Alia germana esperantisto sendas al ni materialojn rakontantajn pri la vivo kaj agado de Vladimir Iliĉ Lenin dum lia elmigrado en Germanio kaj pli ĝuste en la naskiĝurbo de tiu esperantisto.

Post tralego de la leteroj oni disdonis ilin al la esperantistoj en Mezdra por saluti iliajn sendintojn.

La vesperon oni finis per mallonga programo kaj junulara amuzado.

Anĉo Anĉev

En la komenco de oktobro 1967 ni malfermis kurson por komencantoj en la lernejo „V. Apriloŭ“ en vilaĝo Ŝatrovo, distrikto de Kjustendil, kun 12 gelernantoj, ĉiuj de VII-a klaso.

Ĉiuj gelernantoj komencis obstine lerni la lingvon kaj rapide progresis. Post la kvina leciono ili provis korespondi kun samaĝuloj el aliaj landoj. Post nelonge ili bone komprenis la utilon de Esperanto kaj pro tio ili pli entuziasme daŭrigis la lernadon.

Nun ili libere respondas al multaj demandoj, legas kaj skribas bone.

Okaze de la nova jaro 1968 la junpionira E-grupo prezentis malgrandan programon.

Esperanto progresas en nia regiono, ĉar niaj societoj „Balkana konkordo“ (en Ŝatrovo) kaj „Razmetanica“ (en



Panĉarevo) laboras en granda konkordo. Nun komencis lerni Esperanton alia grupo — Gekomsomolanoj, kiu konsistas el 7 personoj. La grupon gvidas k-do Blagoj Jordanov (junulo — 20-jara). La junpioniran grupon gvidas Nikola Nikolov — prezidanto de societo „Razmetanica“.

N. Nikolov

SOVETA-BULGARA AMIKECO

Pasis 90 jaroj de post kiam la rusa armeo kune kun la bulgaraj volontuloj liberigis Bulgarion el la otomana jugo.

La Soveta armeo kune kun la bulgaraj laboristoj kaj kamparanoj liberigis Bulgarion el la faŝistoj.

Nun la Soveta-bulgara kaj bulgara-soveta societoj de amikeco bone kaj fruktodone laboras. Ni povas bone utiligi nian movadon en tiuj societoj kaj pro tio ni devas pligrandigi nian partoprenon en tiuj societoj.

La Soveta-bulgara solidareco kaj amikeco havas profundajn radikojn.

Nun la bulgaroj festas. Tiu festo estas ankaŭ nia.

Je la nomo de niaj gerondetanoj kaj gekursanoj varme kaj sincere ni gratulas la bulgaran popolon kaj deziras al ĝi novajn prosperojn en ĉiuj sferoj

de ĝia vivo.

Aparte ni sendas niajn bondezirojn al ĉiuj anoj de BEA, de la bulgaraj esperantaj revuoj.

Permesu al ni ankaŭ transdoni per la gazeto „Bulgara Esperantisto“ niajn sincerajn bondezirojn al niaj amikoj el Bulgario: Otonov, Ĉirpanski, Debrelev (Asenovgrad), Vasilev (Pazargik), Oŝanski, Grigorov, Nanov, Murgin (Sofio), Paŝtrapanski (Vraca), Dimov (Varna), Ĥristov (Kârgali), Dimitrova (Gabrovo), Ĥeljazkov (Momkovo—Ĥaskovo), Batkilev (Plovdiv), Mollov (Posev — Silistrensko), Georgiev, Voseva (Velingrad), Drenski, Arabariev (Stanke Dimitrov).

Vivu la Soveta-bulgara Amikeco!

Vivu la Esperanto-movado!

Amike N. I. Siga



En Kaluga, Soveta Unio, antaŭ ne-
longe oni inaŭguris kosmonaŭtikan mu-
zeon nomitan memore al unu el la pio-
niraj de kosmonaŭtiko, Konstantin Edu-
ardoviĉ Ciolkovskij (1857—1935). La
inaŭguro koincidis kun la 10-jara datre-
veno de la lanĉo de la unua artefarita sa-
telito. La muzeo enhavas grandan ko-
lekton da objektoj rilatantaj al kosmon-
aŭtiko, aviado kaj raketa tekniko, i. a.
la unuaj sovetaj eksperimentaj raketoj la-
nĉitaj en 1933, la sputnikoj kaj lunikoj, la

aŭtomata interplaneda stacio Venera
kaj la kosmoŝipo Vostok, en kiu Ga-
garin unuafoje veturis en la kosmon,
en aprilo 1961. La muzeo posedas an-
kaŭ elektronan „Informan Servon“, kiu
kapablas respondi 800 demandojn pri
la kosmo.

K. E. Ciolkovskij estis konata ankaŭ
pro sia interesiĝo pri la lingva pro-
blemo. En 1934 li membriĝis al Sovet-
respublikara Esperantista Unio. (Laŭ
Unesco Features kaj Informa Servo de
UEA).

REMEMOROJ PRI ĈUDOMIR

Koncize mi rakontos pri la granda bulgara
ĥumoraĵ-verkisto Ĉudomir, pri lia lastfoja re-
stado en Kazanlâk. La aŭtunaj tagoj estis nu-
baj kaj la suno malofte traboris la densan vua-
lon de la preskaŭ ĉiam sterniĝanta nebulo.
Malgraŭ tio, Ĉudomir ĉiam estis en la urbaj
stratoj, kvankam serioze malsana, lia vizaĝo
estis difektita pro la malsano, la korpo jam
ankaŭ serioze estis konsumita kaj la vestoj
sur ĝi videble lumoviĝis. Ni ĉiuj klare kaj
dolortime rigardis la novan aspekton de nia
ŝatata belulo kaj amato. Ni ĉiuj sciis, ke la
morto lin embuskas, sciis tion ankaŭ li. Tio
lin faris ankoraŭ pli ŝatata kaj koramata. . .
kaj neniu jam demandis la kuracistojn pri lia
sanstato, kaj li daŭrigis la ŝercojn pri sia malbona
sorto, kvazaŭ la morto ne ĉeestis proksime. . .
Sed dum siaj lastaj tagoj li ĉiam parolis pri
la morto: . . . „Ho, Aleko (la verkisto Aleko
Andreev) pli rapide forpasis. . . Pro kio lin
oni tiel malorde mobilizis. . . La juĝinvitulo
estas por mi, sed la leterportisto de sankta
Petro verŝajne enoficiigita laŭ maniero de pa-
renceco, faris grandan eraron!“ . . . „Ivane,
diru ian novaĵon el la rondoj de la legantoj
de ĵurnaloj! Se mi povas rememori, la kance-
ron en la paradizo oni nun sukcese kuracas
kaj por mi nur tiu ĉi malsanulejo helpas!“ . . .
kaj sincere ekrigardas. La rido modesta kiel
li, lasas sur la vizaĝon fajrecajn striojn —
tiom trankvilaj kaj ŝerce li parolis pri la morto,
kiun li atendis stoike kaj ŝerce. . . Kiam ni,
la aŭskultantoj lin konsolis kaj kuraĝigis, li
tuj ekmarŝis ien, movante la manon proteste.
Ni bone komprenis tiun ĉi movon de la mano
kaj la konversacio de Ĉudomir daŭris ĝis kiam
li dronis en alian straton. . . Tro malsana, ĝis
la lasta momento Ĉudomir estis sur la urba
bazarplaco interparolante vigle kaj ĉiam ŝerce
kun ĉiuj, ĉar li ĉiujn rozvalanojn bone konis

kaj al ĉiu interparolanto kun li sciis la tendencon
de Aĥilo. . . „Ivane, via edzino estis malsana,
kio okazis al ŝi?“ „Ŝi mortis — respondis
mi, antaŭ kelkaj monatoj! . . .“ Ĉudomir ekri-
gardis min, sur lia vizaĝo aperis la konata ri-
deto kaj li ekirinte al la bazarlo aldonis ankaŭ
ŝerce: „Mi nepre al ŝi portos korsalutojn!“ . . .
„Nu, Ivane, nia kara Aleko iomete erarigis la
situacion — li estiĝis forpasinto anstataŭ mi,
sed post nelonge ni aranĝos la kontojn. . .“
„Baĉo Mitjo, kiel vi fartas?“ — demandas iu
lin. „Nu, same kiel fiŝisto kaptadas kankretojn
kun lipharetoj“ . . .

Sed en tia ŝercema aspekto ni lin konas ne
nur dum liaj lastaj tagoj, sed ankaŭ dum lia
tuta vivo.

Ĉiutage mi estas sur la bazarplaco de Ka-
zanlâk kaj marŝas sur la stratoj, sed lin mi
plu ne renkontos! Mi ne vidos lian fruntbuk-
lon, kiu lin faris belulo, ĉar la fruntbuklo kun
lia ĉiam ridetanta vizaĝo, ŝercemo kaj milda
parolado estis ĉe li io neripetebla, persona
trajto de Ĉudomir. Ĝin vi ĉiam povas vidi sur
liaj fotoĵoj. Ĝi estas la sama, kiam mi inter-
parolis kun li kaj li diris al mi deklamante
kelkajn ŝercajn strofojn en Esperanto kaj mik-
saĵojn kun Ido. . . sed mi ne klopodis enskribi
ilin en mian kajeron kaj mi tre bedaŭras. Kiu
kredis, ke li post nelonge mortos?! . . . Ho,
ni ankaŭ nun ne kredas, ke Ĉudomir forpasis!

Nia devo estas, ke ni, kiel espetantistoj,
ne nur legu lian verkaron, sed ankaŭ ĝin tra-
duku en Esperanton. Tiel la tutmonda espe-
rantistaro konatiĝos kun liaj verkoj, ridos kune
kun ili kaj aplaudos la verkiston Ĉudomir —
la filon de Valo de la Rozoj! . . .

Rimarko: Aleko estas la nomo de la poeto
de Kazanlâk — blindulo — Aleko Andreev,
kiu mortis nur unu monaton antaŭ Ĉudomir.

Ivan Zahariev

SPORTA KONKURSO OKAZE DE LA XXI PAC-KONKURO

Lige kun la okazonta de la 9 ĝis la 24 de majo 1968 Internacia Biciklista Pac-Konkurso Berlino-Prago-Varsovio, Pola Radio aranĝas por siaj aŭskultantoj Grandan Sportan Konkurson. En nia Konkurso oni devas respondi du demandojn:

1. Diru la naciecon de biciklisto, kiu okupos la unuan lokon en la definitiva individua klasifiko da la XXI Biciklista Pac-Konkurso.

2. Nomu la ŝtatojn, kies teamoj okupos la du laŭvicajn unuajn lokojn en la definitiva kolektiva klasifiko de la Pac-Konkuro.

Inter la partoprenantoj de la Konkurso, kiuj alsendos trafajn respondojn estos lotumitaj premioj kaj memordonaĵoj, kiel: senpagaj alvenoj por 12-taga estado en Pollando inkluzive atrakciaj ekskursoj tra nia lando, elfaraĵoj de la pola popola arto, diskoj kun pola simfonia, popola kaj distra muziko, polaj poŝtmarkoj kaj aliaj.

La respondojn oni devas sendi ĝis la 16 de majo 1968 (decidas la dato de la poŝta stampo) al la adreso: Pola Radio, Varsovio, poŝtkesto 46, Pollando, kun la kromnoto Sporta Konkurso. Ni petas legeble kaj precize skribi la antaŭnomon, nomon kaj ple-

nan adreson. Oni rajtas sendi plurajn respondojn, sed ĉiujn sur aparta, afrankita poŝtkarto.

Komencante de la unuaj tagoj de aprilo en la disaŭdigoj de la Pola Radio estos prezentataj detalaj informoj pri la biciklistaj teamoj startontaj en la XXI Pac-Konkuro. Kaj en la daŭro de la Konkuro ni disaŭdigos ĉiutage raportojn pri la biciklista rivalado okazonta sur la vojoj kondukantaj el Berlino tra Prago al Varsovio. Ni atentigas, ke la respondojn oni rajtas sendi ĝis la 16 de majo 1968, sekve la partoprenintoj de nia Konkurso havos multe faciligitan taskon pro fakto, ke ili konos la rezultojn de la unua semajno de la Pac-Konkuro kaj orientiĝos tute bone pri la prepariteco de la unuopaj teamoj kaj biciklistoj.

Komunikon pri la rezultoj de la Konkurso ni anoncos la 16 de junio 1968, en nia ĉiutaga programo en Esperanto. Krome ĉiuj partoprenantoj en la Konkurso ricevos skribitajn informojn pri ĝia rezulto.

Ni invitas vin partopreni la Konkurson kaj deziras bonŝancon.

Pola Radio

OFICIALA KOMUNIKAĴO DE LA AKADEMIO

Petite de la Germana Esperanto-Asocio (DEB) „Solve la problemon de la pasivaj participoj laŭ Zamenhof“, kaj de la unuanima decido de la Komitato de UEA „kiel eble plej baldaŭ difini tiun solvon“;

Samtempe konsultite de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UEF) kaj de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) pri la ĝusta senco de kvar tipaj frazoj, kiaj povas troviĝi en diplomatio, jura aŭ politika dokumento, nome:

1. „Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstrua-

taj en 1970“ = do la garantiantoj estos kvitaj!“

A) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon;

B) nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.

2. „Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo“ =

A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;

B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.

3. „Ni asertas, ke la aŭtomobilo de s-ro X estis efektive riparata la lastan semajnon“ =.

A) la lastan semajnon oni efektive okupigis pri la riparado de la aŭto;

B) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon.

4. „Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio“ =

A) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;

B) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

La Akademio, per 26 voĉoj el 31 voĉdonintoj (kaj 6 kromaj blankaj voĉdoniloj) decidis kaj deklaras, ke en ĉiu el tiuj frazoj nur la senco A estas konforma al la tradicia lingvouzo de Zamenhof, kaj ke ĉia alispeca interpreto estas neoficiala. Tiu decido cetere nur

konfirmas kaj kompletigas la rezulton de la voĉdono farita de la Akademio en Julio 1965 pri la senco de la pasivaj participoj en la Fundamento.

Ĉia eblo de dusenceco en la uzo de tiuj participoj estas do forigita per ĉi tiu decido kaj ni esperas, ke la aŭtoroj de lernolibroj de nun konsideros la ĉiusuprajn modelajn frazojn en la senco aprobita de la Akademio.

La 25-an de Novembro 1967.

G. Waringhien, *Prezidanto*

P. Neergaard, } *Vicprezidantoj*

A. D. Atanasov, }

R. Bernard, *Sekretario*

D. B. Gregor, *Direktoro de la Gramatika Sekcio*

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ

La Lao-Revolucio dudekjara. Neo Lao Haksat-Eldonejo 1967. La libro enhavas jenajn ĉapitrojn: Noto de la eldonisto; I. Skizo pri la lando (kun mapo); II. Longa tradicio de lukto kontraŭ la imperiistoj; III. Manovroj kaj fiaskoj de la Usona imperiismo en Laoso; IV. La bloko de Nacia unueco Lao; V. La revolucia Lao-armeo; VI. La liberigita zono, frukto de dudekjara revolucia ago; VII. La Lao-popolo ne sole luktas.

La libro havas tekston de 35 paĝoj kaj 12 paĝojn sur luksa papero kun diversaj ilustraĵoj el la vivo kaj bataloj de Lao-popolo.

Vojaĝimpresoj de egipto tra Eŭropo kaj Azio per Esperanto de D-ro Nasif Isaac, ps. D., MS. D., dumviva membro de UEA. La libro aperis en julio 1967, havas 64 paĝojn kun multaj ilustraĵoj. Prezo: 5 internaciaj respondakuponoj. Mendebla ĉe UEA aŭ rekte de la aŭtoro (P. O. Box 1221, Cairo, U.A.R.).

Balaton, la plej granda lago en Mez-kaj Okcident-Eŭropo. Riĉe ilustrita broŝuro sur luksa papero kaj kun plej

diversaj utilaj sciindaĵoj pri hoteloj, moteloj, kampadejoj, ekskursoj, muzeoj, sporto, konekse kun la Jaro de Internacia turismo — 1967 — Jaro de la fremdultrafiko.

Danaj sandviĉoj, riĉe ilustrita broŝureto pri kiamaniere oni povas prepari „buterumitan panon“ laŭ dana maniero aŭ aĉeti la produktojn de *Plumrose* en Danlando.

Internacia Jura Revuo. II jaro, n-ro 1, januaro—marto 1967, organo de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Redaktoro D-ro Lajos Márton, Budapeŝt. Enhavo: Hungara juro de heredo de D-ro Lajos Márton (Hungario). La programo de UN pri larĝa konigo de signifo de la Internacia Juro; La pozicio de advokato en Norvegio de Ten Arbo Hoeg (Norvegio); La pozicio de advokato en Danlando de Terje Mølleruo (Danlando); La pozicio de advokato en Germanio de D-ro W. Herrmann (GFR); Pri juro en Skandinavio de Eskil Svano (Danlando); Forumo: La plej granda honorario de Roman Sakowicz (Pollando); Librobreto: „La socialisma juro“ de Ak. I. Szabo, m. 1.

50-datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. Tezoj de Centra Komitato de KPSU. Moskvo, 1967. Eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de Sovetaj esperantistoj ĉe la Unio de Sovetaj Asocioj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj. P. 77, 20×14,2 cm.

Todor Jivkov. Naŝa Kongreso de la Bulgara Komunista Partio. Raporto kaj ferma parolado. Novembro 1967. Eldonejo de fremdlingva literaturo, str. Levski 1, Sofio. P. 184, 16,5×11,5 cm.

Gvidlibro por Supera ekzameno. II. Skizo de historio kaj literaturo de Esperanto. Redaktis Alfonso Pechan. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1966. P. 190, 19,5×14 cm.

Luu Quy Ky. La vjetnama pro-

blemo. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, Vjetnamio, 1967. P. 73, 19×12 cm.

Hai Thu. Nord-Vjetnamio kontraŭ la US aermilito. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, Vjetnamio, 1967. P. 95, 18,5×13 cm.

Reuven Kritz. Freŝa mateno, e hebrea lingvo tradukis Ota Ginz, ilustris kaj la kovrilon desegnis Jona Kollmann. Israelo, 1967. P. 281, 18,5×11,5 cm. Prezo 24 steloj afrankite. Ricevebla en la Eldonejo *Pura*, Simtat Oren 4, Kirjat Moskin, Israelo, kaj ĉe libroservoj.

* * *

Salzburg. la urbo de la Muziko, interesa, kun varia enhavo prospekto pri la kvaregranda urbo de Aŭstrio.

TRA LA GAZETARO

En j. „*Borba*“ — Veliko Târnovo (de 6. V. 1967) — artikolo de B. „Tjutjunktov“ — „La Internacia Lingvo Esperanto“.

En la sama ĵurnalo (de 14. XII. 1967) — artikoloj de Doĉo Doĉev — „Veliko Târnovo kaj la Internacia Lingvo Esperanto“ kaj de Hristo Manolov — „La voĵetoj de la amikeco“.

En j. „*Oteĉestven Zov*“ — Vraca (de 12. XII. 1967) — artikolo kun foto (la instruisto Bojĉo Mladenov kun gelernantoj) de Ivan Spasov — „Kreskas la nombro de la esperantistoj“.

En j. „*Narodno Delo*“ — Varna (de 16. XII. 1967) — sciigo en la kroniko pri solena kunveno kun parolado de G. Dimov pri Zamenhof.

En la sama ĵurnalo (de 19. XII. 1967) — sciigo en la kroniko pri „Rondo esperantista“ (ĉiumarde kaj ĉiujaŭde).

En j. „*Naroden Drugar*“ — Jambol (de 23. XII. 1967) — sciigo pri vespero dediĉita al Zamenhof je la 26-a de decembro 1967.

En j. „*Oteĉestven Front*“ — (de 13. XII. 1967) — anonco de „Vsestranni Uslugi“ pri kurso de Esperanto konekse kun la IX-a Tutmonda junulara Festivalo en Sofio.

En j. „*Veĉerni Novini*“ (de 13. XII. 1967) — sciigo pri renkontiĝo de la ĉefurbaj geesperantistoj la 15-an de decembro.

En la sama ĵurnalo (de 14. XII. 1967) — sciigo pri la sama renkontiĝo.

En la sama ĵurnalo (de 25. XII. 1967) — anonco ke E-societo „Globuso“ malfermis desegnan oficejon.

En la sama ĵurnalo (de 29. XII. 1967) — anonco de Bulgara Esperantista kooperativo pri E-libroj.

En j. „*Rabotniĉesko Delo*“ (de 31. I. 1968 — en la rubriko „Indaj distingo“ — sciigo ke la Prezidiumo de la Bulgara Parlamento konekse kun la 60-jara datreveno de la fondiĝo de BEA ĝi estas honorita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ I grado pro ĝia daŭra (60-jara) kulturkleriga agado.

En j. „*Borba*“ — Veliko Târnovo (de 28. XI. 1967) — informo de V. Vladimirov — „Sviŝtov — ĉefurbo de la bulgara E-junularo“ — pri la II tutlanda konferenco de la studentaj E-societoj.

En j. „*Oteĉestven Glas*“ — Plovdiv (de 17. XII. 1967) — informo pri kunveno, dediĉita al Esperanto, kiu okazis en Karlovo je la 15-a de decembro 1967.

En j. „*Ŝumenska Zarja*“ (de 4. I. 1968) — longa artikolo de Cv. Todorov — „Esperanto — rimedo por internacia kompreniĝo“.

En j. „*Dobruĝanska Tribuna*“ — Tolbuĥin (de 28. XII. 1967) — informo de Kirĉo Kalinkov pri E-solenajo okazinta la 21-an de decembro.

En j. „*Zarja na Komunizma*“ — Loveĉ (de 9. I. 1968) estas presita la rakonto „Dum unu minuto“ de la hungara verkisto Kamen Istvan, publikigita en „Bulgara Esperantisto“ (n-rd 12/1966). La tradukon faris Kiril Kalĉev.

En la dumonata scienc-metodika revuo **Biologia i ĥimia** (Biologio kaj ĥemio) — organo de la Ministerio de la popola instruado kaj de la Asocio de la bulgaraj ĝeinstruistoj — aperanta en Sofio n-ro 6/1967 en la artikolo „Vasil Ĥristov Bozarov“ de A. Pen'ev, dediĉita al la merita instruisto, ĉefredaktoro de la revuo, vicdirektoro de la Scienca-esplora Instituto pri pedagogio „Todor Samodimov“ ĉe la Ministerio de la popola instruado Vasil Bozarov konekse kun lia 60-jara datreveno, la aŭtoro donas skize la biografion de la jubileulo, rakontas, ke li estis membro de la E-societo ĉe la pedagogia lernejo kie li studis kaj estis ĝia sekretario. Vasil Bozarov naskiĝis la 24-an de novembro 1907 en vil. Pravc, regiono de Botevgrad.

Por lia soci-politika kaj kleriga agado k-do Bozarov estis honorita dufoje per ordeno „Kiril kaj Metodij“.

En j. „Iskârska Komuna“ — Mezdra (de 25. I. 1968) — artikolo „Vespero de la Esperanto-letero“ la aŭtoro A. Anĉev rakontas pri tiu vespero, kiun organizis E-societo en la urbo konekse kun la 80-jara datreveno de la kreo de E. kaj 60-jara datreveno de la fondiĝo de BEA. Oni ricevis 60 leterojn el 9 landoj (Francio, Estonio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario, Siberio, Litovio, Latvio, GDR).

En j. „Ĉapaeovski Zov“ — gara Belovo, regiono de Pazarĝik (de 30. I. 1968) — en la artikolo „Antaŭ la 37-a kongreso de BEA“ la aŭtoro J. Nikolov, prezidanto de E-societo „Leono“ en vil. Momina Klisura, rakontas pri la agado de la societo en la vilaĝo konekse kun la XX kongreso de IFEF kaj 37-a de BEA en Varna kaj pri la vasta korespondado kiun faras la societaj membroj. Tie oni regule preparas propagandajn agittabulojn kaj vitrinojn.

En j. „Haskovska Tribuna“ (de 8. II 1968) — en artikolo „Al la Esperanto-kongreso kun bona agado. Internaciaj kontaktoj de la esperantistoj en Dimitrovgrad“ la aŭtoro J. Zaprianov rakontas pri la jara kunveno

de E-societo „Internacia Amikeco“ en Dimitrovgrad, kiu disvolvis varian agadon dum 1967 jaro (reciprokaj gastadoj, kursoj, aktiva partopreno en la junulara festivalo en Kazanlâk. k. a.).

En j. „Dimitrovgradska Pravda“ (de 8. II. 1968) — en la artikolo „Aktiva agado“ la aŭtoro J. Zaprianov rakontas pri la agado de E-societo „Internacia Amikeco“.

En j. „Veĉerni Novini“ (de 10. II. 1968) anonco de E-societo „Globuso“, ke ĝi malfermis desegnan oficejon.

En j. „Septemvrijsko Zname“ — Pazarĝik (de 14. II. 1968) — en mallonga artikolo „Por paco en la mondo“ la aŭtoro K. Genĉev rakontas pri la jarkunveno de E-societo „Radio“ en Pazarĝik kaj pri varia agado dum 1967 jaro.

En la libro „Sevlievo kaj regiono de Sevlievo“, esploroj, materialoj kaj dokumentoj, volumo 1. Sofio, 1967, redaktoro-kunmetinto Ĥr. M. Jonkov, oni mencias Esperanton en tri lokoj: sur paĝo 90 en la artikolo „La lernejo je la nomo de Ĥaĝi Stojan kaj la ribelo dum majo 1876 jaro en la regiono de Sevlievo“ de Jonĉo Panov, la aŭtoro skribas, ke dum la tria jardeko de XX farcento en tri lernejoj oni kreas novajn revoluciajn nestojn — oni organizas klubojn de la esperantista, virina, turisma societo k. a.

Sur paĝo 334 en „Bibliografio pri Sevlievo kaj regiono de Sevlievo“ de Nikolaj P. Kovaĉev, la aŭtoro mencias la artikolon de Doĉo T. Stanev „La kongreso de la bulgaraj esperantistoj“ publikigitan en j. „Razvitie“ — Sevlievo, n-ro 22, de 25. VII. 1938 kaj n-ro 25 de 10. VIII. 1938 (la kongreso okazis en Sevlievo je 16—18. VII. 1938).

Sur paĝo 350 en la sama „Bibliografio“ punkto XVIII — Sevlievo — centro de libroeldonado, ĵurnalismo, scienco, literaturo kaj arto — oni mencias la nomon de ĵurnalo „Fratego“ monata gazeto por frateca vivo, jaro I, 1932, redaktoro At. Nikolov.

NEFORGESEBLA TRAVIVAJO

La glora kvindekjara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio estis celebrita ankaŭ de la sovetiaj esperantistoj. Ili trovis apartan originalan manieron por fari tion. La ĉiujara Baltlanda Tendaro estis dediĉita entute al la granda kaj grava okazaĵo, kiu skuis la mondon kaj la popolojn.

Inter la nemultaj (nur ok) tendaranoj el Bulgario estis ankaŭ la subskribinto. Tamen la kontaktoj kun la sovetiaj kaj alilandaj esperantistoj estis tiom abundaj, ke tio rekompencas la partoprenon multfoje. Vere, ni devis havi pli multe da amikoj popersone por kon-

tentigi ĉies intereson, sed ja ankaŭ ni havas ne malmulte da interesoj.

Jen, ni estas en la Tutrespublika Palaco de la Laboristaj Sindikatoj de la Litova ĉefurbo Vilnius, kiu estas la loko de la tendaro. Bona orkestro ludas agrablan muzikon kaj la dancado kaj interkonatiĝoj, akompanataj de amikaj babiladoj, faras la atmosferon intima kaj la okazon interesa kaj memorinda. La morgaŭan tagon oni oficiale malfermos la tendaron, tamen la programo jam komenciĝis. Ĉio funkcias bone kaj kontentige. Kompreneble, la mastroj ĉiam estas malkontentaj. Ili deziras

fari la aranĝon pli impresa, pli interesa. Tiel estas ĉiam.

La sekvan tagon en la sama palaco, kiu estis la stabo de la aranĝo, okazis la solena malfermo de la Tendara programo. La ceremonion partoprenis kaj salutvortojn al la partoprenantoj prezentis interalie la reprezentantoj de la Litova Akademio de la Sciencoj, de la Komitato por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj de la Respubliko kaj de la Ministerio por klerigo de Litova SSR. Solenan malferman paroladon en litova lingvo, ĉar estis destinita al la ne-esperantista publiko, prezentis la prezidanto de la Vilnusia Klubo kaj prezidanto de la Organiza Komitato, malnova konato de la bulgaraj esperantistoj — Antanas Poška, D-ro pri antropologio.

Salutas la aranĝon ankaŭ la eksterlandaj gastoj. Preskaŭ kongreso estis la aranĝo. Ĝin partoprenis pli ol 400 personoj el naŭ landoj kaj el preskaŭ ĉiuj sovetiaj Respublikoj. La atmosfero ankoraŭ pliintimiĝis kaj tiu proceso daŭris ĝis la lasta tago. La serion de la prelegoj de la Somera Universitato malfermis k-do Andrej Rakov per prelego pri la evoluo de la revolucio en Petrogrado (Leningrado), ĝis la lasta decida momento. Multe da prelegoj ebligis al la partoprenantoj pliriĉigi siajn sciojn ĉu pri Litovio, ĉu pri aliaj sovetiaj popoloj.

La ekskurso tra la urbo kun Esperantlingva gvidanto kaj la ekskursoj al Valakampjaj (Valakampiai) kaj al la antikva ĉefurbo de Litovio — Trakaj (Trakai) malfermis interesan paĝon el la historio de la lando kaj de la popolo kaj el la geografio de la lando. Ne mankis ankaŭ la bona volo de niaj tre komplezaj mastroj montri al ni kiom eble plej multe sian landon. Akompanate de litovaj esperantistoj ni vizitis malnovajn muzeojn kaj ekspoziciojn en la urbo, kiuj ebligis al ni ekkoni la popolon ankoraŭ pli bone. Apartan intereson por la eksterlandaj esperantistoj elvokis la granda ekspozicio pri Esperanto kaj la esperantista movado en Litovio, kiu estis organizita en la Centra Tutrespublika Biblioteko.

Por la bulgaraj partoprenantoj, kiuj unuafoje havis okazon senpere kontaktiĝi kun litovoj

kaj ekkoni vortojn el la litova lingvo estis aparte interesa la fakto, ke multaj litovaj kaj bulgaraj vortoj koincidas, kvankam la gramatiko kaj la alfabeto, same kiel la formo de la vortoj sufiĉe diferencas en la du lingvoj. Eble tio sufiĉe forte influis por starigo de tre intimaj rilatoj inter la bulgaraj gastoj kaj la litovaj mastroj.

Tagon post tago, aranĝon post aranĝo proksimiĝis la fino de la tendaro-forumo. Mi estos maljusta, se mi ne mencias la „tute senpagan ekskurson“ kiun ofertis al la tendaranoj la amiko de Bulgario, docento Gruško el Rostov-Don. Mi ne povas forgesi ankaŭ la vesperojn de la Estona kaj Latva popolarito, kiujn prezentis partoprenantoj en la tendaro. Certe ne malpli grava estis la prezentita tre bona hungara vespero. Tiu programo prezentis kantojn (en Esperanto) kaj dancojn de la hungara popolo. La karaj mastroj ne postrestis. Ankaŭ ili prezentis la popolariton. Kolektivo de amatora arto prezentis litovajn kaj estonajn dancojn kaj aliajn erojn de la litova arto. La partoprenantoj danke aplaudis la aktorojn.

Ja ne estas eble en unu korespondaĵo mencii kaj pritrakti ĉiujn erojn de la programo, kiu estis tiom abunda kaj interesa, ke neniuj el la partoprenintoj ĝin povos forgesi ĝis la fino de sia vivo. Mi deziras aldoni nur, ke estas tre bona la fakto kaj la ebleco por organizo de esperantistaj aranĝoj en Sovetio. Tiu lando havas tiom da interesaĵoj, ke ĉiam estas valore ĝin viziti. Krome, la sovetiaj esperantistoj estas ambiciaj en la uzado de la lingvo en siaj kontaktoj kun eksterlandanoj kaj intersiaj samlandanoj, kio ebligas al ili atingi altan nivelon de uzado de la lingvo.

Ĝuste pro la supre menciitaj kaŭzoj la partoprenantoj el eksterlando estis unuanimaj, sugestinte, en la fino de la tendaro, ke ankaŭ dum la venontaj jaroj oni devas klopodi organizi la tendarojn en la baltlandaj respublikoj tiamaniere, ke estu ĉiam ebleco por eksterlandanoj partopreni en tiuj gravaj kaj interesaj aranĝoj. Ŝajnas, ke jam la titolo „tendaro“ ne povas esprimi la enhavon de la aranĝo. Eble pli konvena estus la vorto forumo.

Il. Andreev

LOGIKO KAJ LINGVO

(Resumo de la prelego de A. D. Atanasov je temo „Logika lingvo kaj Lingva logiko“, jarita en kunveno de la Sofiaj esperantistoj-filologoj la 25-an de decembro 1967).

Esperanto estas logika lingvo. Tion ni asertas, kiam ni klarigas la kvalitojn de Esperanto kaj la esencon de

ĝia strukturo. Tio ĉi signifas, ke la logiko gvidas kaj devas gvidi la uzadon de ĝiaj konsistaj elementoj, por esprimi



la penson de parolanto (aŭ skribanto) kaj efektiviĝi komunikiĝon inter homoj.

Sed kiel ni komprenu *logikon*? Laŭ Кратка бълг. енциклопедия (Malgranda Bulgara Enciklopedio) „la diversaj konceptoj pri logiko diferencas inter si laŭ tio kiel oni komprenas la ĝustan (korektan) pensadon“.¹

Lingvo estas ilo por esprimado de la homa psika vivo — pensado kaj ankaŭ emocioj. Lingvo kaj pensado estas intime ligitaj. En sia formiĝo kaj evoluo la lingvo sekvas la vojon de la pensado.

Aperas demando: ĉu povas ekzisti *pensado sen lingvo* — alivorte, ĉu en la procezo de la pensado oni nepre devas muldi en la cerbo siajn pensojn en lingvaj formoj. Laŭ la pli multaj aŭtoroj pensado sen lingvo ne estas ebla. Cni parolas pri *interna* parolo (lingvo) diference de *ekstera* parolo (lingvo)². Laŭ la asertoj de la bulgara filozofo Angel Bănkov — (en lia verko „Мислене и език“ — Pensado kaj lingvo) „la esenco de la interna parolo konsistas ne en prononcado aŭ skribado de vortoj, sed en ties reproduktado en formo de imagoj (представи), akompanataj de certaj muskolaj movoj kaj eksentoj.“³ Per tiuj ĉi asertoj, aliflanke, ne povas klariĝi kiamaniere pensas senlingvuloj (ekz. la surdmultuloj).

Ĉiukaze, pensado kaj lingvo estas ligitaj kaj interinfluas sin reciproke.

Se nia pensado estas logika (t. e. ĝusta, korekta, senerara) la lingvo devas helpi nin esprimi la pensojn klare — logike, ĝuste.

Sed ĉu la homa pensado estas ĉiam senerara? La homa cerbo ja ne estas

cibernetike preciza maŝino, la psika vivo ne rivelas sin ĉiam logike, en trankvila konsekvenco. La konfuzoj kaj hezitoj en la psikaj procezoj nature reflektiĝos ankaŭ sur ilian esprimadon.

Aliparte, la diversaj naciaj (etniaj) lingvoj ne prezentas sistemon racie konstruitan: dum sia evoluado ili suferis la efikon de diversaj faktoroj fiziologiaj, fonetikaj, psikaj, deflankigaj analogioj ktp., rezulte de kio en ili kreiĝis multaj nekonsekvencaĵoj kaj nelogikaj esprimoj (la „esceptoj“ en la gramatikoj, k. a.), kiuj obstaklas logikan esprimadon (pleje kiam la lingvo estas uzata de alilingva persono).

Esperanto, kiel racie konstruita lingvo, kompreneble, ne estas submetita al la efiko de la nomitaj faktoroj, sed en ĝia aplikado, en la kombinado de ĝiaj elementoj, en la konstruado de ĝiaj frazoj ofte efikas influoj de iu aŭ alia nacia lingvo. Tiaj influoj povas esti utilaj, se la profitataj modeloj estas klaraj kaj plimultigas la eblecojn por formado kaj perfektigo de la frazeologio. Ne mankas tamen ankaŭ malbonaj kombinoj de esprimado, ĉerpataj el diversaj naciaj lingvoj; ili kaŭzas konfuzon en la komprenado de la pensoj.

Esperanto estas kaj devas esti logika. En kia senco? Eminentaj lingvistoj emfazas, ke la lingvoscienco ne devas esti ligata kun la logiko¹.

Sed aliaj asertas, ke la lingvoj posedas logikon, tamen ne en senco de „lerneja teoria logiko“ (O. Jespersen), sed en senco de „praktika ĉiutaga logiko“ (la sama), „logiko en la komunua kompreno de tiu ĉi vorto“ (St. Ullman), „logiko de celkonformeco“ (la sama).

Iuj esperantistoj komprenas logikecon de la internacia lingvo en senco

1) En la sama artikolo de la nomita Enciklopedio sekvas klarigo pri specoj de logiko: *tradicia*, (resp. *klasika*), *formala*, *matematika*, *dialektika*.

2) *Вътрешна и външна реч*.

3) Aliloke la aŭtoro tamen asertas, ke „la demando pri la esenco de la interna parolo... ne estas ankoraŭ klarigita“.

1. Schuchardt (Ŝuhard): „Elpelo de la logiko el la lingvoscienco derulus pezan ŝtonon de la menso de la lingvistoj“; V. A. Zvegincev: „La semasiologio tre maltrafe estas entrenata en la matematikan logikon“ k. a.

de *matematika precizeco*. Ili estas pedantaj ĉe la konstruado de esprimoj kaj plej ofte ĉe elektado de uzota vorto. Ĝuste ne tiel ni devas kompreni la logikon de lingvo, kiu devas servi por facila kaj rapida interkomunikiĝo, kiu devas esti „vivanta lingvo“.

Matematike preciza lingvo supozigas: 1) severe senemocian prozan stilon; 2) ke ĉiu vorto havas nur unu signifon — severe fiksitan en malvastaj limoj; 3) ke metafora uzado de la vortoj ne estas permesata; 4) konstantan fiksitan ordon de la vortoj en la frazo.

Tian lingvon bezonas la sciencoj, kaj la sciencistoj strebas apliki la uzatajn lingvojn al tiaj postuloj. Tia lingvo estas necesa ankaŭ al la cibernetiko. Sed por belliteratura verkado kaj ne malpli por la ĉiutaga komunikado tia lingvo estos neaplikebla. La penado esprimi sin ĉiam nepre kun matematika precizeco, „science“, katenus la lingvon, malfaciligus ĝian uzadon kaj fine mortigus ĝin. Por tiuj bezonoj la lingvo devas sekvi kaj adaptiĝi al la homa psiko. En tia lumo ni devas kompreni ankaŭ la eldirojn de Zamenhof en liaj „Lingvaj Respondoj“:

„Ne sole en la naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto da bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika, ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon *absolutan*, tiam la libera uzado de lingvo artefarita fariĝos tute neebla, ĉar tiam malaperos ĉiu utileco de longa ekzercado kaj en la deka jaro de uzado de la lingvo, kiel en la unua jaro, ĉiu devus konstante tro longe pripensadi kaj pesadi ĉiun sian vorton“. (Resp. 3, 1906).

„Mi devas ripeti ĉi tie tion, kion mi jam kelkajn fojojn esprimis ĉe aliaj okazoj, ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem nur katenus kaj ofte, por esprimi plej simplan ideon, ni devus uzi vorton deksilaban; ĉiufoje, kiam ni sen timo de malkompreniĝo povas doni al la uzanto liberecon, ni devas tion ĉi fari kaj permesi al li uzi laŭvole *diversajn* formojn (se ili nur ne estas kontraŭ la leĝoj de nia lingvo aŭ kontraŭ la logiko aŭ komprenebleco), anstataŭ postuli, ke li nepre uzu ĉiam nur unu formon“. (Resp. 11, 1907).

Ĉiu lingvo havas *sian* logikon. La strukturo, ekzemple, de la hindo-eŭropaj lingvoj entenas filozofian sistemon por esprimi rilatojn inter ago, aganto, objekto de l'ago, cirkonstancoj. Ili havas lingvajn rimedojn por tiu ĉi esprimado. Aliaj lingvofamilioj esprimas la montritajn rilatojn per aliaj rimedoj. Esperanto per siaj elementoj ankaŭ povas esprimi tiujn rilatojn, sed ne ĉiam laŭ la principoj de tiu aŭ alia hindo-eŭropa lingvo. Ĝi prezentas sistemon, kiu havas *sian propran logikon*. En ĝi la gramatikaj finaĵoj ne estas simple fleksiaj elementoj, sed ĉiu el ili portas memstare ideon. Ekzemple, **o** ne estas nur formala signo de substantivo; ĝi entenas ĝeneralan ideon pri **io** kio ekzistas (reale aŭ en supozo) — ĉu kiel konkreta objekto, ĉu kiel abstrakta nocio. La samon ni povas diri pri ĉiu alia ĝramatika finaĵo kaj ĝenerale pri ĉiu elemento en Esperanto. Tio estas esenca trajto de Esperanto; ĝi permesas ĉiajn eblajn kombinojn de la apartaj elementoj (lingveroj) — ĉu ni nomos ilin radikoj, prefiksoj, sufiksoj ktp. — *nur kondiĉe ke riceviĝu senca nocio*.

En la Antaŭparolo al la *Unua Libro* (1887) Zamenhof klarigas tiun ĉi esencan trajton de Esperanto jene:

„La tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole el sensanĝaj vortoj. . . Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj ktp. estas esprimataj per la kunigo de sensanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj alkiutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro ne traleginte la antaŭparolon, . . . — li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.“

Tio klarigas ankaŭ la *propran* logikon de Esperanto kiel lingvo. Kiu deziras uzi korekte la lingvon, esprimi sin klare kaj esti ĝuste komprenata, li devas kompreni kaj koni la esencon



de ĝia strukturo, la signifon de ĉiu ĝia elemento, la principojn por kombinado de tiuj elementoj. Ĝis kiam niaj pensoj pasus tra nia bulgara lingvo kaj post tio ni penos traduki (en nia cerbo) la formitan penson en Esperanton, la

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Ĵivka Kondurova, str. Peruŝtica 18, Pleven — pri ct. kun ĉl.

— Veneta Ilieva, str. Major Gortalov, Pleven — kolektas BK, gramofondiskojn, poŝtmarkojn el ĉl.

Nikola Atanasov Joĉkov (junulo) Varna, str. Janko Karagjaurov 15 — ŝatas muzikon, skribu ruse, france kaj esperante.

Dobran Enĉev Dobranov, vil. Dve Mogili, distrikto de Ruse — dez. korespondi kun esperantistoj el ĉ. l.

Fervojista E-societo „Espero“, Plovdiv, p. k. 190 — deziras korespondi kun fervojistoj el la tuta mondo.

Germanio

Werner Pfennig (24-jara), D-214 — Ahklam, Demminerstr. 80 — deziras korespondi kun bulgaroj.

Curt Ziesihang, 8733 Bad Bochlas, Hauptstr. 39 — interŝanĝas BK kaj PM.

Hungario

Istvan Csiszár (10-jara knabo), Szóreg, Petőfi 14 — pri PM, muziko.

Mária Csilós (17-jara komercistino), Szeged, Aprilis 4 u. 27.

Erzsébet Szegi (17-jara knabino), Szentes, Budavai N. A. 11, pri bk., pm.

Erzsébet Korményos (18-jara knabino), Szatymaz, III. k. 132. pri bk., pm.

Ilona Nyemcsok (18-jara knabino), Mazóberény, V. k. 162 — pri bk., pm., teatro, aktorbildoj.

József Rábai (18-jara fraŭlo), Kiskunfélegyháza, Damjanich 25, pri bk., pm., gramofondiskoj, muziko, filmo.

Margit Kormos (19-jara knabino), Szeged, Hunyadi J. sgt 23, pri bk., filmo, muziko.

Mihaelo Lada (64-jara pensiulo), Budapest XXI Csepel, Magyar u. 48 — kun samaĝaj bulgaroj pri historio kaj geografio.

uzado de la lingvo estos malglata, malrapida kaj ofte malĝusta. Ni devas eksenti la sencon de ĉiu el la elementoj de Esperanto kaj *pensi rekte en Esperanto*.

Csüllög Etekla (25-jara instruistino), Vészto Arany Tanos utca 1/a — kun ĉl, petas adresojn de 14—18 jaraj geknaboj por siaj gelernantoj.

Vás Marcins 15, tere 2. Stefano Kövi (instruisto).

Budapest II, Fenyu. 8 III, Jozefo Todor (67-jara).

Budapest XIX, Bem u. 66, Erika Tunge (knabino).

Miskolczi Kászlo (20-jara studento), Kecskemét, Izsáki u. 10 — pri gramofondiskoj, muziko, filmo, belartoj.

Erzsébez Molnár (20-jara knabino), Szóreg, Községi Tanács — pri bk., stenografio.

László Vóneki (21-jara fraŭlo), Szeged, Balfasor 46 — pri bk., gramofondiskoj, muziko, filmo, sporto.

László Babarczi (21-jara fraŭlo), Domaszék 598. p. c. t., kolektas bildkartojn, respondo garantiita!

Szilveszter Dobó (22-jara fraŭlo), Domaszék 311. p. c. t., kolektas bildkartojn, respondo garantiita!

László Szücs (2-jara fraŭlo, fervojisto), Makó, Hajnal 8 — pri bk.

Lilla Szabo (23-jara studentino, agregacia kand.), Dunaszekcső, Kinizsi Pál 1 — pri bk., muziko.

Jolán Zsótér (29-jara fraŭlo), Békéscsaba, Szabagság tér 5, — pri lingvo Esperanto, turismo, literaturo, muziko.

Veronika Kovács (36-jara fraŭlino, oficistino), Csanytelek, Ady E. 43 — pri muziko, filmo.

Ottó Tolnay (37-jara instruisto), Szeghalom, Séke 14 — pri bk., pm.

Makovinszky Lászlóné, Budapest, X., Üllői ut. 126—130, XIV. ép.

Jugoslavio

Tridek lernantinoj (16—18-jaraj) de meza medicina lernejo en Zagreb, serĉas korespondamikojn el tuta mondo. Skribu al: „E-grupo, Škola za medicinske sestre, Mlinarska 34, Zagreb.

Mongolio

Ĉandman (25-jara poŝtisto-fraŭlo), 35-a poŝtofiĉejo, Ulanbatoro.

Redakta komitato: Kiril DRAŤEV, Dimitr ĴDRAKOV, Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV (ĉefredaktoro), Simeon D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV, Kunĉo VALEV

Adreso de la redakcio:

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

Pollando

Leli Pill (16-jara), Wrocław, I. Liceo Ğ, str. Poniatowski 9 — deziras kor. kun ĉl.

La grupo de la gekursanoj, kun kiuj oni povas kontaktiĝi senpere aŭ pere de ilia instruisto: D-ro Franciszek Skalniak, Szczakowa, Kościuszki 3.

Krystyna Kasperzyk, Szczakowa, Kolejarzy blok Huty Szkła.

Zofia Janigacz, Szczakowa, Kościuszki 3a.

Wacław Janigacz, Szczakowa, Kościuszki 3a.

Władysław Woźniak, Szczakowa, Kościuszki 3a.

Eulalia Rajtarska, Szczakowa, Jagiellońska, Dom Kultury.

mag. Urszula Szuster, Jaworzno, Osiedle Stale, Technikum Ekonomiczne.

mag. Janina Olszanecka, Jaworzno 37.

Barbara Kozłowska-Miazga, Jaworzno, Osiedle Podwale, blok 24/37.

ing. Marian Kozłowski, Jaworzno, Zacisze 24.

Edward Janigacz (13-jara knabo), Szczakowa, Kościuszki 3a.

Andrzej Trochanowicz (14-jara knabo), Szczakowa, Kościuszki 3a.

Jerzy Kasperzyk, Szczakowa, Kolejarzy, blok Huty Szkła.

Ewa Wacławik (20-jara) Szczakowa, k/Huty Szkła.

Wiesława Paluch (17-jara), Jaworzno, Górnicza 19.

Anna Jamróz (15-jara), Jaworzno, Matejki 32 b/17.

Zbigniew Drobniak (14-jara) Jaworzno, Plac Jana 9.

Władysław Pióro, Jaworzno, Bulgi 3/36/13.

Wiesława Kadluczka (18-jara), Jaworzno, Nalkowskiej 4/11.

Teresa Badko (18-jara), Jaworzno, Wapienna 7.

Stanisława Gelej (18-jara), Jaworzno, Obronców Poczty Gdańskiej 2.

Krzysztof Kozłowski (9-jara knabo), Jaworzno, Zacisze 24.

Jadwiga Kaluża (17-jara), Jaworzno, Osiedle Oszczelnik 9/1.

Barbara Kartasińska (17-jara), Jaworzno, Poswale 136.

Kazimiera Koczur (17-jara), Jaworzno, Wilkoszyn 78.

Jerzy Otrebski (18-jara), Jaworzno, Wilkoszyn 74.

Anastazja Radko (17-jara), Jaworzno, Olshewskiego 69.

Maria Żak (19-jara), Jaworzno, Urzędnicza 7.

Józefa Bak (19-jara), Jaworzno, Wilkoszyn 32.

Maria Bak (22-jara), Jaworzno, Wilkoszyn 32.

Teresa Budak (18-jara), Jaworzno, Barbary 9.

Krystyna Byrszek (18-jara), Jaworzno, polowa 36 B.

Janina Mulka (17-jara), Szczakowa-Dobra, Jaworowa 26.

Małgorzata Kiem (16-jara), Szczakowa Topol.3.

Wanda Nowak (17-jara), Szczakowa-Dobra, Jaworowa 27a.

Halina Zborowska (16-jara), Szczakowa, Jagiellońska 28.

Zofia Podsiadlo (16-jara), Szczakowa, Jagiellońska 21/7.

Janina Szymczakiewicz (18-jara), Szczakowa, Jaworznieka 3/12.

Aleksandra Goldamer (18-jara), Szczakowa, Górnoślaska 38.

Wierzbicki Jan (14-jara knabo), Jaworzno, Poczta 9a/208.

Jerzy Gronowski (20-jara), Szczakowa, Kolejarzy 8/11.

Zbigniew Starożyk (19-jara), Szczakowa, Wołności 2.

USSR

Krasnodarskij kraj, Gorjačii ključ, ul. Bazaraja 82, Kononenko Faina (23-jara oficistino) dez. kor. kun la tuta mondo.

Kersti Kalmet (20-jara), Järvskandi Tehased „M. Gorkij“ p. st. 29, Estona SSR — dez. kor. kun Koreo, Hindio, Belgio, Francio, Rumanio.

Boris Ğuistov, 19 Sadova St., Jalta, Krimeo.

Rodionova Anja (18-jara studentino), urbo Ivanovo, str. Sovetskaja 7 — interesigas pri kinoarto kaj literaturo.

Zejtunjan M. S. (instruisto), Kaliningrad-Oblastnoj, Glavpošta, ab. Ja. 14 — dez. kor. kun ĉl, interesigas: pentrado, sporto, kosmo k. a.

Pirojkova Galina (16-jara oficistino), Ivanovo 3, str. Krasnie zori d. 1, kv. 218 dez. kor. kun ĉl.

Gutkina Rima, Ĉilanzar, kvartal 3, d. 16, kv. 18, urbo Taškent-115 — dez. kor. kun diversaj landoj.

Ĥamidulina Tanja, Ĥlopkova 17, urbo Taškent-100 — deziras kor. kun tuta mondo.

Litova SSR, Klaipeda-8, str. Tarybines Armijos 52—2, Fiodokovas Aleksas — dez. kor. kun junuloj el tuta mondo.

14—15-jaraĝaj ĝelernantoj, membroj de E-Rondeto ĉe Klubo de Internacia Amikeco, en majo 1968 aranĝos Leterv-speron kaj E-ekspozicion. Skribu amase! Respondo Garantata. Adreso: E-Rondeto ĉe Palaco de Pioniroj kaj Lernantoj je la nomo de V. I. Lenin, str. K. Marksa 9, Taškent-18.

Blinder Josif, str. K. Marksa 65, e 46, Taškento-47 — dez. kor. kun gejunuloj el tuta mondo.

Lobaĉ Mark. str. Gogolo 87, e 4, Taškento-47 — dez. kor. kun junuloj el tuta mondo.

Sergienko Sergej, str. Sapjornaja 27, korp. 16, e 12, Taškento-15 — dez. kor. kun tuta mondo.

Koncebovski Stanislav, str. Ĥukovskaja 49, e 19, Taškento — „poĉtam“ dez. kor. kun tuta mondo.

